# *francilia esperanto-federacio*
# jarraporto 2004–2005

En Februaro okazis « Expolangues ». Espéranto-France (UFE) provizis budon. La gejunuloj de Espéranto-Jeunes (JEFO) prizorgis la aferon kaj esperantistoj de nia federacio helpis ilin.

En Marto multaj esperantistaj francilianoj helpis la nordan Esperanto-federacion okaze de la centjara datreveno de la unua Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-Maro.

En Aprilo Espéranto-Ile-de-France organizis sian membrokunvenon en Poissy (78) en la « Relais international de la jeunesse ».

De pluraj jaroj ni ŝanĝas lokon por nia membrokunveno, por ke ĝi okazu ĉiujare en malsama departemento de Francilio (77 en 1997, 94 en 1998, 75 en 1999, 92 en 2000, 95 en 2001, 91 en 2002, 91 en 2003, 77 en 2004, 78 en 2005).

Philippe Bérizzi, la prezidanto de Espéranto-Ile-de-France, anoncis, ke li kaj lia edzino Karine baldaŭ translokiĝos al Bretonio. Ankaŭ Xavier Godivier, kiu laboras kun Philippe, translokiĝos al Bretonio. Ili restos membroj de la komitato ĝis Marto 2006. Tamen Philippe ne rekandidatiĝas kiel prezidanto.

Posttagmeze ni vizitis la urbon Poissy, la preĝejon « Collégiale », la muzeon de ludoj kaj la distilejon de la fama likvoro de Poissy.

En Aprilo la komitato kunvenis kaj elektis la novan estraron. Prezidanto : Vincent Charlot ; vicprezidantinoj : Sylviane Lafargue & Armelle Piolat ; kasisto : Henri Lafargue.

En Septembro la federacio deĵoris en pluraj forumoj de asocioj : Brétigny-sur-Orge (91), Montrouge (92), Paris 4e, Asnières (92) kaj en pluraj aliaj lokoj.

En Oktobro reekis la kursoj en la sidejo kun ŝanĝoj en la organizo. Axel Rousseau instruas por la unua grado, Michèle Abada-Simon por la unua kaj dua grado, kaj Anne Jausions instruas je la tria grado.

Novembre Jean Delhomme rekomencis la konversacian rondon, kiu ne plu okazis. Ĝi okazas ĉiujn duan kaj kvaran merkredojn de la 18a30 ĝis la 20a, krom ferioj.

**Dum la tuta jaro**

Trimestra kunveno de la komitato de nia federacio Espéranto-Ile-de-France.

Konversacia rondo ĉe la sidejo, ĉiujn duan kaj kvaran merkredojn je 18a30 (de Novembro 2005 ĝis Junio 2006).

Esperanto-kursoj trigradaj ĉe la sidejo, lunde, marde, ĵaŭde (de Oktobro ĝis Junio).

Lundaj babiladoj por la progresantoj (ĉiun duan lundon).

Semajnfinaj staĝoj ĉe la sidejo, unuagrada.

Akurata aperigo de bulteno *Flash Espéranto Ile-de-France*. La bulteno informas pri la esperantista movado, en la pariza regiono & en la tuta mondo.

Dum la komitatkunsido de nia federacio, la 30an de Junio, la redaktoro de *Flash* (Jean Lazert) anoncis, ke li ne plu povos prizorgi la realigon de tiu bulteno. Armelle Piolat & Albert Sanson provizore redaktos la bultenon.

**Rilatoj kun Espéranto-France (UFE)**

Helpo ĉe la sidejo : multaj bonvolemuloj de nia federacio helpas ĉe la « Cerisaie » pri diversaj taskoj.

Post la « dua emeritiĝo » de la kutimaj deĵorantoj, Louise Marin kaj Materne Schmidt le Roi, la plimulto de la franciliaj esperanto-aktivuloj laboras en la sidejo nur por Espéranto-France kaj ne plu havas tempon por prizorgi aferojn de la francilia federacio. Tio estas granda problemo por la vivo de nia federacio. Bezonus pli da bonvolemuloj por dispartigi la taskon de Espéranto-France kaj de Espéranto-Ile-de-France. Se ne, ĉu la francilia federacio pluekzistos ?

*Raportis : Albert Sanson*
*Reviziis : Vincent Charlot*